# INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 255 — Julio, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — Kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## FRANCOJ KAJ ANGLOJ EN KANADO

Kio kaŭzis, ke en Kanado estas parolataj kaj la franca kaj la angla? Ĉu la rilatoj inter franc- kaj anglalingvanoj estas foje streĉitaj? Ĉu Esperanto povus helpi kanadanojn konstrui komunan identecon? Al tiuj demandoj mi provos ĉi tie skize respondi. Fine mi diros kelkajn vortojn pri la miaopinie ne tiom timenda eblo, ke Kebekio povus iam fariĝi sendependa lando.

### De 1760 ĝis nun

En 1760 Francujo posedis grandan parton de la nunaj Ontario kaj Kebekio (la du ĉefaj provincoj de Kanado) kaj ankaŭ la centran parton de la nuna Usono. Francaj koloniistoj tamen plejparte loĝis en la valo de la riverego Sankta-Laŭrenco, en la nuna Kebekio. Post milito en 1760 kaj la Traktato de Parizo en 1763, Francujo cedis preskaŭ ĉiujn nordamerikajn teritoriojn siajn al Anglujo aŭ Hispanujo. La norda parto de Nov-Francujo trafis al angloj, la suda al hispanoj.

La nov-franca loĝantaro devis rapide adaptiĝi al tute nova, malfacila, situacio. Ĝiaj konkerintoj havis ne nur malsaman lingvon, sed ankaŭ malsaman religion ol ĝi: la francoj estis plejparte katolikaj kaj la angloj protestantaj (ĉefe anglikanoj). Tiutempe religio gravegis.

En 1783 la Traktato de Versajlo ratifis la finan sendependiĝon de la dektri ŝtatoj de Nov-Anglujo, fariĝontaj poste Usono. La ceteraj anglaj teritorioj de Ameriko – tiuj, kiuj poste fariĝis Kanado – tamen restis posedaĵo de Anglujo.

En 1812 ekestis milito inter Usono kaj Kanado. Por ke la franckanadanoj helpu la anglojn kontraŭbatali Usonon, la angla registaro tiam cedis al la franckanadanoj

plurajn gravajn rajtojn rilate religion kaj uzadon de la franca. Tiu plano sukcesis kaj post kelka tempo la usonaj trupoj retiriĝis.

Kanado estas nun ŝtato sendependa, kun nur malmultaj restantaj formalaj ligoj kun Britujo. Ĝi estas federacio de dek provincoj kaj tri teritorioj. Krom la tutlanda federacia parlamento kaj registaro, ĉiu provinco kaj teritorio havas propran parlamenton kaj registaron. Federacinivele la angla kaj franca lingvoj ambaŭ oficialas.

Laŭ la censo de 2001, el 30 milionoj da kanadanoj, preskaŭ 7 milionoj (23%) estis francdenaskuloj. Samjare, el ĉi lastaj, preskaŭ 6 milionoj loĝis en Kebekio, kie ili konsistigis 82%-n de la tuta kebekianaro. En Montrealo, la plej granda urbo de la provinco kaj la dua urbo de Kanado (la plej granda estas Toronto), ili konsistigis 69%-n de la tuta montrealanaro. Kia estas la nuna situacio en Kebekio?

## En Kebekio

La franca estas la sola oficiala lingvo de la provinca registaro de Kebekio. Laŭleĝe ĉiuj kebekiaj geknaboj, escepte tiujn, kies gepatroj jam studis en anglaj lernejoj *en Kebekio,* devas ĉeesti francajn bazajn kaj mezajn lernejojn. Altan lernejon oni rajtas libere elekti. Sed multaj, kiuj rajtus elekti anglan lernejon por siaj infanoj, sendas ilin al franca lernejo, por ke ili plej bone lernu la francan, por havi pli da ŝancoj en sia onta profesio. Samkiale plejmulto de la anglaj lernejoj de la provinco intense instruas la francan.

La kebekia leĝo ankaŭ postulas, ke ĉiuj publikaj afiŝoj kaj ŝildoj, ĉu komercaj, reklamaj aŭ administraciaj, estu aŭ tute aŭ ĉefe (depende de la loko) en la franca.

Kial tiaj leĝoj? En Kebekio regas sufiĉe ĝenerala interkonsento, eĉ inter anglalingvanoj, ke tiuj leĝoj estas necesaj: sen ili la fortega premado de la angla, el la ĉirkaŭanta nordamerika kaj monda medio, ja endanĝerigus la francan.

Kiel fakte vivas kaj kunvivas la franca kaj angla komunumoj de Kebekio?

La anglalingvaj kebekianoj plejparte loĝas en Montrealo. Tiuurbe publikiĝas tri ĉefaj ĵurnaloj – du franclingvaj, unu anglalingva – kaj estas kvar universitatoj – du franclingvaj kaj du anglalingvaj. Kompreneble, oni tie povas spekti filmojn, koncertojn kaj teatraĵojn ambaŭlingvajn. Estas francaj kaj anglaj televidkanaloj kaj radiostacioj. Samurbe estas hospitaloj ĉefe franclingvaj kaj aliaj ĉefe anglalingvaj, sed kiu ajn homo rajtas flegigi sin en ajna hospitalo, kie li rajtas uzi ajnan el ambaŭ lingvoj. Kvankam en Kebekio oficialas nur la franca, unuopaj civitanoj rajtas uzi la anglan en siaj rilatoj kun provincaj kaj urbaj administracioj. Agnoskendas, ke la statuso de la anglalingva minoritato en Kebekio estas fakte tre avantaĝa, kompare kun tiu de la franclingvaj minoritatoj en aliaj provincoj de Kanado.

## La „du solecoj”

Post pli ol du jarcentoj da komuna historio, tamen, en Kebekio ambaŭ komunumoj ĉiam vivas sufiĉe aparte unu de la alia. Romano kun la titolo ***La du solecoj*** estis

iam verkita pri tiu situacio (Hugh MacLennan [hju maklenan], ***Two Solitudes**, 1945), kaj filmo kun la sama titolo estis produktita laŭ la romano en 1978. La etoson en Kebekio dum la jaroj 1940–1960 traktis ankaŭ la granda kebekia reĝisoro Charles Binamé [ŝarl biname] en sia elstara filmo pri famega tiutempa hokeludanto, Maurice Richard [moris riŝar], kiu fariĝis unu el la grandaj herooj de la franckanadanoj; la filmo aperis en 2005 kun la titoloj „Maurice Richard" (en la franca) kaj „The Rocket" (en la angla – tio estis la kromnomo de tiu hokeisto, eĉ ĉe franckanadanoj). [„The rocket" signifas „la raketo".] Feliĉe la tiutempaj streĉitecoj inter ambaŭ komunumoj jam delonge malfortiĝis.

Sed neeviteble, kiam samteritorie kunvivas du komunumoj, ĉiam daŭras ioma mal-komforto inter ambaŭ. Ekzemple, iom malfacilas la integrado de enmigrintoj, ofte forte logataj de la avantaĝoj de partoprenado en la vasta ĉirkaŭanta anglalingva socio.

Fakte, malgraŭ multaj streboj ambaŭflanke, malmultaj kebekianoj, eĉ kleraj, bone regas ambaŭ lingvojn. Kaj, ĝenerale, eĉ tiuj malmultaj malmulte rilatas kun la alia komunumo, aŭ rilatas kun ĝi nur en sia laboro.

„La du solecoj" estas ĉiam valida priskribo. Jen ekzemplo: mi. Mia denaska lingvo estas la franca, sed miaj gepatroj ambaŭ parolis la anglan kvazaŭ denaskuloj. Ni ne parolis la anglan hejme, sed mi infanaĝe lernis ĝin en Usono kaj Ontario kaj preskaŭ tiel bone regas ĝin ol la francan. Tamen, ekster Esperantujo, mi havas nur tri aŭ kvar anglalingvajn amikojn. Ne ĉar mi ne volas havi tiajn amikojn, sed simple pro tio, ke, en mia ĉiutaga vivo ekster Esperantujo, mi nur malmultajn anglalingvanojn renkontas!

### Kaj ekster Kebekio?

Kiel fartas franckanadanoj ekster Kebekio? Ili relative malmultas. En 2001, el ĉiuj kanadaj francdenaskuloj, 85% loĝis en Kebekio. Samjare francdenaskuloj estis 530 000 en Ontario (8% de ĉiuj ontarianoj), 240 000 en Nov-Brunsviko (34% de ĉiuj nov-brunsvikanoj). Kompreneble, ekster Kebekio, pli malfacilas studi kaj labori en la franca.

### Ĉu oficialigi Esperanton en Kanado?

Kelkaj kanadaj Esperantistoj proponis, ke Esperanto fariĝu oficiala kunliganta lingvo de Kanado. La angla kaj franca ambaŭ aparte malfacilas, kaj Esperanto ja pli facilas. La uzado de neŭtrala lingvo kiel federacia komuna lingvo donus al kanadanoj la senton aparteni al unu tutkanada komunumo.

Tiu ideo tamen havas ankaŭ jenajn malavantaĝojn.

A. Kvankam Esperanto ja pli facilas ol naciaj lingvoj, ni agnosku, ke ĝi fakte ne tiom facilas, kiom ni emas propagandi. Efektive, malmultegaj Esperantistoj vere bone regas Esperanton. Mi mem ne bone regas ĝin. Do ne estus facile por kanad-anoj lerni Esperanton.

B. Sekve necesus produkti tri versiojn de oficialaj tekstoj: Esperantan, anglan kaj francan, kio pligrandigus la kostojn de tradukado, jam altajn en Kanado.

C. Ne eblus trovi sufiĉajn Esperantoinstruistojn por la tuta Kanado.

D. Por franckanadano, unu avantaĝo de la lernado de la angla (anstataŭ Esperanto) estas, ke tio ebligas lin rekte rilati kun la anglalingva mondo. Kaj anglakanadanoj havas simetrian avantaĝon lernante la francan. Tia rekta rilatado kun homoj kaj ilia kulturo gravegas en interkomunumaj rilatoj.

La bezono de komuna lingvo ne estas tiel urĝa en Kanado, kun nur du oficialaj lingvoj, kiel en Eŭropo, kun pli ol dudek. Se Esperanto estus jam vaste uzata mondskale, eble tiam ĝia elekto kiel nacia kanada lingvo havus sencon. Malgrandskale, tamen, Esperanto jam nun pozitive rolas en Kanado, kaj pli ĝenerale en Nord-Ameriko, kiel neŭtrala interkomprenilo; la ĉiujaraj Mezkanada Renkontiĝo (MEKARO, okazanta vice en Montrealo, Toronto kaj Otavo) kaj Aŭtuna Renkontiĝo Esperanta (ARE, en Nov-Jorkio) estas bonaj ekzemploj de tio.

**Sendependa Kebekio?**

Ĉu Kebekio iam sendependiĝos disde Kanado? Pro la malsameco de la kebekia socio, tio povus ja havi sencon. Kial ne? La kvar landoj de Skandinavujo jam delonge sendependiĝis, sen longdaŭraj malbonaj konsekvencoj miascie. Antaŭnelonge Ĉeĥio kaj Slovakio same sendependiĝis, kio tute ne estis katastrofo.

Fakte, laŭ *socia* vidpunkto, Kebekio estas jam aparta lando ene de Kanado! Tion tuj sentas franclingva kebekiano vizitanta alian parton de Kanado, kaj reciproke (mi supozas) eksterkebekia kanadano vizitanta Kebekion.

Sendependiĝo povas esti tute pozitiva afero. Oni povas bonege rilati kun sia najbaro sen loĝi en la sama domo... Malsamdome loĝi povas eĉ ebligi pli bonajn interrilatojn ol tro proksima kunvivado ebligus. Sed mi devas agnoski, ke mi havas nek klaran nek firman pozicion rilate la demandon: ĉu Kebekio devus sendependiĝi aŭ ne?

Jam okazis en Kebekio du referendumoj pri tiu demando, en 1980 kaj 1995, en kiuj respektive 41% kaj 49,4% voĉdonis por iu formo de sendependiĝo. Tiuteme la kebekia loĝantaro estas ege dividita. Kompreneble, la franckanadanoj ekster Kebekio iom timas la eblan dispartiĝon de la lando, ĉar ili konsistigas nur malgrandan parton de la eksterkebekia kanada loĝantaro. Nuntempe, tamen, la temo estas malmulte diskutata en Kebekio. Ĝi neeviteble estos iam denove pridebatata, sed kiam, kaj kun kiu rezulto? Malfacilas antaŭdiri.

Sed mi konkludu per trankviliga rimarko. Substrekendas ke, eĉ se sendependiĝus Kebekio, ĉiuj partoj de la iama Kanado devus tamen, por sia propra intereso, daŭre konservi tre proksimajn ligojn inter si. Kanado fakte ne malaperus! Ĝi nur transformiĝus, fariĝante unio aŭ konfederacio de almenaŭ du landoj kun intimaj ligoj.

— Francisko Lorrain (Montrealo)